



# Protokolo

## Komitatkunveno de TEJO

23 aŭgusto 2022, 14.00 (UTC+2)

IJK en Westelbeers, Nederlando

### Tagordo (laŭ la ŝanĝoj en punkto 2a)

Antaŭ malfermo: <a href="#">Kontrolado de ĉeestantoj</a>			
#	Tagordero	Subtemoj	Daŭro
1	Malfermo	Elekto de kunsidestro	10 min
		Elekto de propona teamo	
		Elekto de voĉdona teamo	
2	Tagordo	Fikso de cetera tagordo	5 min
3	Elekta Komisiono	Nomumo de elekta komisiono	10 min
3	Elekto de la komitatanoj Ĉ		10 min
4	Financoj kaj dungoj	Diskuto pri la financoj de TEJO rilate al la novaj informoj, establo de prioritatoj kaj agadplano rilate al la dungoj.	50 min
5	Lingvopolitikaj pozicioj	Prezento de la dokumento Debato pri enhavo/plibonigo	30 min
6	Konduto dum IJK		10 min
7	Ceteraĵoj	Aldonaj traktindaĵoj laŭ la bontrovo de la Komitato.	15 min

## Protokolo

**Protokolas:** Lenka.

**La protokolon prilaboris ankaŭ:** Tobiasz, Veronika, Léon.

**El la protokolo oni forigis informojn kiuj aperis en la fermita parto de la sesio, sed kiuj laŭleĝe ne povas esti publikigitaj.**

### 1) Malfermo

**Léon** malfermas la kunsidon kaj bonvenigas ĉiujn.



## 1a) Elekto de la kunsidestro

**Konstanze** mallonge prezentas sin kiel kunsidestro jam proponita de la Estraro antaŭ la kunsido. Voĉdonado pri la elekto de kunsidestro: evidenta plejmulto voĉdonas pore, **Konstanze** estas akceptita kiel kunsidestro.

### 1aa) disponeblo de la sesio por retaj ĉeestantoj

**Michael Boris** levas la temon pri la hibrideco de la kunsido: ĉu homoj sukcesis konektiĝi, aliĝi kaj ĉu oni invitis homojn partopreni rete. **Tobiasz** kaj **Roĉjo** klarigas ke pro teĥnikaj kialoj ne eblas vivelsendi la sesion. Fine tamen oni sukcesas malfermi Zoom-ĉambron, kaj la ligilo por aliĝi estis sendita al la Telegram-grupo "TEJO Telegram" kaj al la komitata retlisto. Pere de Zoom al la kunsido aliĝas estrarano **Nickson**, komitatano **Hans Becklin**, anstataŭata komitatano **Patricio Iglesias** kaj membro **Robert Nielsen**.

## 1b) Elekto de la propona teamo

**Konstanze** demandas pri kandidatoj por la propona teamo. **Michael Boris** kaj **Manuela Burghilea** sin proponas. Ĉiuj krom unu sindeteno voĉdonas pore, la sinproponintoj estas akceptitaj kiel propona teamo por la sesio.

## 1c) Elekto de la voĉdona teamo

**Vit** kaj **KuboF** sin proponas por la voĉdona teamo, evidenta plimulto voĉdonas pore, la sinproponintoj estas akceptitaj kiel la voĉdona teamo por la sesio.

## 2) Fikso de la cetera tagordo

**Tobiasz** nome de la Estraro proponas ŝanĝojn de la tagordo pere de dokumento alirebla [ĉi tie](#). Ĉefe temas pri nova tempodivido, forigo de la tagordero Elekto de la komitatanoj Ĉ, (ĉar ne venis proponoj por komitatanoj Ĉ, elekto de eblaj kandidatoj eblos poste rete) kaj malplilongigo de tagordero pri lingvopolitikaj pozicioj (LPP) de TEJO.

**Léon** informas pri propono preparoli la temon konduto de kongresanoj, kaj ebla ŝanĝo de la Reglamento pri okazado de IJK. La tagordero estas aldonita al la propono antaŭ ceteraĵoj.

**Valentin** klarigas, ke la teksto pri LPP estis sendita antaŭ monato por diskuto, ĝi estis pridiskutita, sed li proponas prokrasti la voĉdonon ĝis posta momento, ĉar ĝi ne estas sufiĉe preta por esti akceptita.

Neniu alia proponas aŭ amendas temon aŭ tagorderon.

Voĉdonado pri nova tagordo

- *La Komitato akceptas la novan tagordon kiun la Estraro proponis kun la petitaj aldonoj kaj forigoj.*
- evidenta plejmulto poras, ŝanĝoj akceptitaj



### 3) Elekta Komisiono

**Kunsidestro** demandas pri kandidatiĝoj por la Elekta Komisiono. Ne venis proponoj por la Elekta Komisiono. Elektro de eblaj kandidatoj eblis rete poste.

Okazas diskuto pri tio, ĉu voĉdoni kaj elekti membrojn de la Elekta Komisiono, ĉu fari tion bloke aŭ individue.

**Tobiasz** rememorigas, ke la alvoko por fariĝi membro de la Elekta Komisiono estis sendita al la Komitato de **Roĉjo** pli frue kaj ke neniu reagis. **Tobiasz** ankaŭ rememorigas la kondiĉojn por membriĝi en la organo.

**Roĉjo** deklaras sin volonta por esti membro de Elekta Komisiono ekde la 1-a de septembro (ekde sia eks-estraraniĝo).

**Tyron** proponas unue voĉdoni ĉeeste pri **Roĉjo** (ekde la 1-a de septembro), poste rete pri sekvaj kandidatoj, samtempe rekonfirmante **Roĉjon**.

Oni diskutis ĉu tia procezo estus enorda laŭ la reglamentoj.

Oni proponas voĉdonon pri Roĉjo nun. Oni proponas taski la Estraron agi por trovi kandidatojn por la Elekta Komisiono (**Roĉjo** rememorigas, ke tiu organo devus laŭreglamente esti elektita tuj post la elekto de la estraro). Oni diskutas, ĉu voĉdoni bloke organizi plurajn voĉdonojn por lasi la eblon bloki unuopajn kandidatojn. **Veronika** esprimas sian preferon por unuopaj voĉdonoj. La propona teamo faras proponon por la voĉdono.

Voĉdonado pri Elekta komisiono

- *La Komitato elektas samideanon Rogier "Roĉjo" HUURMAN al la Elekta Komisiono ekde la 1-a de septembro.*
- evidenta plimulto poras, akceptita
  
- *La Komitato elektos la ceteron de la Elekta Komisiono kun aparta voĉdoneblo pri la unuopaj kandidatoj; la voĉdonado ekos la 15-an de septembro.*
- evidenta plimulto poras, akceptita

### 4) Financoj kaj dungoj

**Léon** klarigas, ke pro konfidencaj kialoj kaj ĜDPR ne eblas publike preparoli kaj disdoni personajn informojn, pri dungitoj, ekzemple pri salajro. Tial nome de la Estraro li proponas diskuti tiun temon en fermita sesio. Venas kelkaj demandoj de **Robert** per Zoom pri la neceso fermi la parton de la sesio. **Léon kaj Veronika** klarigas, ke kvankam oni ne planas diskuti pri speciale tiklaj temoj, en la diskuto verŝajne aperos la alteco de la salajroj de la oficistoj kaj aliaj detaloj rilate al iliaj laborkontraktoj, kaj laŭleĝe tiu informo ne povas esti publikigita de la dunganta organizo.

Voĉdonado:

- *La Estraro proponas ke la tagordero pri financoj kaj dungoj okazu en fermita sesio kiun ĉeestu nur Komitatanoj, anstataŭantoj, kunsidestro kaj protokolantoj.*



- evidenta plimulto poras, unu sindetenas, propono akceptita, homoj, kiuj ne estas komitatanoj, anstataŭantoj, kunsidestro kaj protokolantoj foriras

**Michael Boris** atentigas pri la ĉeesto de la retaj partoprenantoj. Oni konsentas ke **Vít** legu, kion la retaj partoprenantoj skribas en la babilejo de la Zoom-ĉambro.

**Léon** informas ke materialoj por tiu ĉi parto de la kunsido estis senditaj pli frue al la komitatanoj (rekte, ne en la retlisto, pro datumprotektaj kialoj). La materialoj enhavas prezentaĵojn kun demandoj kaj respondoj kaj klarigoj pri la situacio pri dungitoj kaj proponas nun kune kun la Komitato decidi.

**Veronika** kun helpo de la prezentaĵo sendita al la komitatanoj priskribas la nunan situacion de la dungoj: kiom da dungitoj estas, kio estas iliaj salajroj kaj laborkondiĉoj. Ŝi ankaŭ donas ĝisdatigon pri la buĝeto (nesukceso de la subvencipeto de la societo Zamenhof, jam interkonsentita 5 mil eŭra kontribuo de UEA al la salajro de la teĥnikisto kaj malfermo al aldona kontribuo, subvencipeto de la Fondaĵo Junularo de UEA (pli-malpli 10 mil eŭroj), decido de UEA donaci la gajnon de la aŭkcio okazinta dum UK al TEJO kaj instigi ke la membroj de UEA kaj la Societo Zamenhof donacu al TEJO). Sume tiuj kontribuoj atendeble rezultigos en atingo de almenaŭ 20 mil eŭroj de la 40 mil eŭroj buĝetitaj kiel diversaj kontribuoj al la dungoj de TEJO. Nome de la Estraro ŝi demandas al la Komitato ĉu estas la volo de la Komitato ke la Estraro serĉu ŝparojn por la buĝeto pere de maldungo de iu aŭ iuj oficistoj.

**Tyron** ankaŭ mallonge prezentas ESF, usonan fondaĵon, kiu pretas akcepti kaj helpi se TEJO proponos ion konkretan, ekzemple okazigon de Retoso aŭ laboron pri la arĥivoj.

**Michael Boris** demandas pri la skalo de eblaj ŝparoj kaze de eventuala maldungo aŭ nerenovigo de la kontraktoj de ĉiuj oficistoj. **Veronika** respondas ke, inkluzivante ĉiujn kostojn de maldungoj, tiu scenario malpligrandigus la deficiton en la buĝeto nur ĝis 45 mil eŭroj.

**Tyron** demandas, kiam oni ekkonos la decidon pri la administra subvencio por 2023. Oni respondas, ke estos iam inter marto kaj majo 2023.

**Léon** informas pri alia eblo: paŭzo en dungoj por eviti danĝeran situacion kun la volo redungi la oficistojn post certiĝo ke la administra subvencio estas ricevita.

**Lucas** demandas ĉu UEA, kiu ja partoprenas en la dungado de la oficistoj, povas helpi al TEJO. **Léon** respondas ke UEA ja subtenas, sed TEJO kiel sendependa organizo devas mem solvi siajn financajn problemojn.

**Michael Boris** rimarkigas pri komentoj ene de la Komitato kaj Estraro de UEA kiuj montras mankon de fido de UEA pri TEJO. Li diras ke tiun situacion forte influis la evoluoj pri AKSO.

**Michael Boris** rememorigas kio estas AKSO kaj kial ĝi estas tiom grava elemento de la rilatoj UEA-TEJO.



**Manuela** demandas pri la plialtigo de salajroj en la reviziita buĝeto. **Veronika** klarigas kaŭzon de la ŝanĝoj: ŝanĝo de la kontraktaj labordevoj de Vincent pro AKSO, plialtigo de la minimuma salajro en Nederlando kaj certigo de ferimono de dungitoj.

**Léon** atentigas pri la ĝeneralaj bonaj rilatoj inter la Estraro de TEJO kaj la nuna Ĝenerala Direktoro de UEA Martin Schäffer. Li aldonas ke la reviziita buĝeto ne plene antaŭvidas la profiton kiun TEJO verŝajne havos dank' al diversaj nunaj (ekzemple la Muzikalo) kaj ontaj projektoj.

**Manuela** demandas pri malfermaj alvokoj por dungitoj, kiujn oni laŭ reglamento devus fari. La Estraro respondas ke pri teĥnikaj oficistoj oni ne faris alvokon, ĉar ne temis pri novaj dungoj sed pri plilongigo de la kontrakto de jam oficantaj dungitoj. **Manuela** rimarkigas ke prefere la tuta procezo estu pli travidebla.

**Léon** konsentas ke necesas esti pli strikta kaj travidebla. Li volas ke la oficistoj pli videble partoprenu en la agadoj de la organizo, ekzemple ke ili partoprenu IJK-on en la formo de laborvojaĝo.

**Miguel Bento** demandas pri la minimumdaŭra plilongigado de kontraktoj. **Veronika** respondas, ke la situacio komplikas kaj ke pro la nunaj leĝoj en Nederlando, ne indas fari ege mallongan plilongigon, ĉar ĉiuokaze ĉiu laborkontrakto estas kalkulata kaj post certa nombro de laborkontraktoj la sekva ne povas havi difinitan daŭron. Laborkontraktoj en Germanio iom pli flekseblas.

**Veronika** klarigas, helpe de la antaŭe senditaj materialoj, la konsekvencon de eblaj maldungoj aŭ nerenovigo de la kontraktoj.

- Teĥnikistoj – ebla maldungo endanĝerigus AKSO-n, kaj nerealigo de AKSO kaŭzus ke TEJO ne ricevus la lastan laŭkontraktan pagon de UEA (30 mil eŭroj) kaj eventuale estus respondeca pri aldona kompenso de damaĝoj kaŭzigitaj per rompo de la AKSO-kontrakto. **Tyron** kaj **Léon** proponas teni ambaŭ dungojn nur ĝis la fino de la jaro kaj informi UEA-n pri tio. **Hanso** demandis, ĉu certas sukcesa fino de la projekto. La Estraro respondas ke surbaze de la ĝisnuna laboro kun Mia ne estas kaŭzoj por kredi ke la intenco ĉesigi la kontrakton fine de la jaro influos tion.
- Volontula kunordiganto: surloka kunordiganto de volontuloj estas necesa parto de la volontulaj projektoj kaj ne eblas uzi por tio la oficistojn de UEA, ĉar ili ne plu estos en Roterdamo. Kaze de tia maldungo, la nova Estraro devus serĉi manieron por certiĝi ke la volontula programo povas daŭri.
- Subvencipetado: tiuj dungoj estas la plej alta fonto de enspezoj por TEJO.

Eblas serĉi redukton, kun transpreno de la laboro de du oficistoj fare de nur unu oficisto. Tio dependas de la eventuala akcepto de la kondiĉoj de ambaŭ oficistoj.

**Michael Boris** proponas estontece trejni iun oficiston por esti ankaŭ surloka kunordiganto samtempe, realigeble kun administra subvencio.



**Tyron** aldonas ke ne estas daŭripove havi 3 dungitojn, kiuj faras la saman laboron.

**Manuela** atentigas, ke laŭ la reguloj de la volontulaj projektoj, volontulo ne povas fari laboron de oficistoj. Ili povas helpi oficistojn, sed ne estas permesate anstataŭigi oficistojn per volontuloj.

**Valentin** aldonas ke Spyros laboras ankaŭ kiel eksterrilatisto, li zorgas pri rilatoj kun neesperantistaj organizoj. Krome, li zorgas pri administrado, kio estas grava kontribuo kaj ĝia neokazo povas kaŭzi devon redoni jam ricevitajn subvenciojn.

**Konstanze** kaj **Michael Boris** parolas pri spertoj kiel eksaj estraranoj: laŭ ili laboro sen oficistoj eblas, sed nebonas kaj malfacilas; ankaŭ konsentas, ke tre dolorus ne havi eksterrilatiston.

**Inès** diras ke Spyros laboras pri projektoj tra KdE kaj fondusoj kaj ke ekde 2024 TEJO rajtos kandidatigi por la administra subvencio de KdE (25 mil eŭroj jare).

**Hanso** proponas (re)dungi subvencipetiston kiam estos administra subvencio por tio.

**Veronika** resumas la ĝisnunajn proponojn:

- plilongigi la kontraktojn de Spyros kaj Karlos ĝis fino de la jaro, duontempe,
- fari ke AKSO estu lanĉita ĝis septembro; cimoj reparitaj kaj la projekto dokumentita ĝis la fino de la jaro,
- daŭrigi la kontrakton kun Clément ĝis la fino de decembro,
- venontan jaron, post decembro: ebleco uzi fakturitan laboron anstataŭ laborkontraktoj,
- se Karlos kaj Spyros ne akceptas la proponatajn kondiĉojn, ili laŭeble daŭrigu kiel fakturantoj)
- Clément - laŭ la reguloj de la ESK-programo bezonatas kiel surloka prizorganto.

**Léon** aldonas ke pro novaj volontuloj bezonatas kunordiganto almenaŭ por ilia komenco (septembro, oktobro, novembro).

**Michael Boris** diras ke indas reorganizi, kunigi laboron inter du homojn tiel, ke aŭ Clément lernus subvencipeti aŭ Karlos loĝus en Roterdamo - tio restu laboro por la nova Estraro.

Post demando de **Tyron, Léon** respondas ke la risko por ne ricevi administran subvencion venontjare estas relative malalta kompare al ĉi tiu jaro, ĉar la suma buĝeto de la programo estos duobligita, kaj tiel pli-malpli duoble tiom da organizoj povos ricevi la subvencion por 2023 ol por 2022.

Ĉar la tempo por la planita sesio finiĝis, oni proponas plilongigon de la kunsido:

*La Komitato proponas plilongigon je 30 minutoj.*

- evidenta plejmulto, akceptita



Pro la necerteco pri la personaj preferoj de la laborkondiĉoj de apartaj oficistoj, **Tyron** proponas ke la Komitato voĉdonu pri rekomendo, kaj ne pri decido.

Oni proponas fari paŭzon.

*La Komitato paŭzas 10 minutojn.*

- evidenta plimulto, akceptita

Post la paŭzo, la propona teamo voĉdonigas la rekomendon pri dungoj:

*La Komitato rekomendas daŭrigi kontrakton de, almenaŭ plejparto, de la oficistoj ĝis la fino de 2022, prokrasti la faradon de venontaj kontraktoj al post aprobo de la venonta administra subvencio.*

- evidenta plimulto, akceptita

*La Komitato rekomendas ke TEJO ne daŭrigu la nunajn dungkontraktojn rilate al AKSO post la fino de la jaro 2022 dum kiu okazu la liverado de funkcia sistema kaj de teknika dokumentaro kaj ne ĉefrespondeca pri teknika subtenado de la sistemo.*

- evidenta plimulto, 3 sindetenoj, akceptita

Pro la ankoraŭfoja fino de la dediĉita kunsidtempo, oni proponas plilongigi la sesion ĝis 17:00.

*La Komitato proponas plilongigon je 30 minutoj.*

- granda plimulto, akceptita

**Remalfermo de la kunsido al ĉiuj, surloke kaj rete tra Zoom.**

## 5) Lingvopolitikaj pozicioj de TEJO

**Valentin** prezentas la jam senditan dokumenton, ĝisdatigon de LPP de TEJO, klarigas, kial la temo tiom gravas. Li diras ke la dokumento ankoraŭ ne tute pretas, jam aperis pluraj komentoj, ekzemple pri aldono de bibliografio, eksteraj referencoj. La dokumenton verkis diversaj homoj en malsamaj stiloj, tial necesas unuecigi ĝin. Valentin aldonas ke li ne havas multe da tempo venontmandate, bonvenigas debaton kaj pritrakton de la dokumento dum la venonta komitatkunveno.

**Michael Boris** demandas la membrojn de la nova Estraro, kiam ili planas la venontan KoKu, Li proponas dum ĝi pridiskuti la LPP-dokumenton kaj la buĝeton. **Albert** respondas ke la venonta KoKu ankoraŭ ne estas planata, ĉar ĝis nun okazis nur 1 kunsido, sed li kredas, ke la nova Estraro sukcesos pritrakti la temon. **Tobiasz** diris, ke laŭreglamente eksterordinaraj KoKu okazas laŭnecese kaj ke li subtenas la ideon organizi kunvenon kiam ajn oni trovas tion necesa.



**Jade** aldonas ke necesas plia agado krom verkado de la dokumento. **Tyron** proponas verki ankaŭ resuman mallongan dokumenton pri la enhavo por ke la tuto estu pli facile alirebla.

**Valentin** diras pri sia volo ke la dokumento estu poste tradukita al pluraj lingvoj, interalie la angla kaj la franca, por ke oni povu disvastigi ĝin ankaŭ ekster Esperantujo.

**Michael Boris** aldonas ke la dokumento estas tre utila - la trejnistoj de la nun okazanta seminario pri lingva demokratio uzas ĝin.

**Jade** atentigas ke la celo estas ne nur produkti dokumenton, sed ankaŭ inkluzivigi homojn parolantajn neeŭropajn kaj minoritatajn lingvoj. Anstataŭ daŭre labori pri la teksto, oni devus investi pli da energio en inkluzivigon de pliaj neeŭropanoj, ĉar la enhavo jam estas sufiĉe bona.

**Tyron** sugestas ke pli bone estus jam baldaŭ havi disponeblan dokumenton por redakti kaj plibonigi poste. **Michael Boris** esprimas sian konsenton kaj demandas la opiniojn de la ĉeestantaj neeŭropanoj. **Albert** parolas pri Azia kaj Amerika KJK-oj, en kiuj partoprenis ankaŭ kelkaj LPP-laborgrupoj, li kredas, ke pliaj homoj povus ekinteresiĝi. **Patricio** esprimis sian subtenon kaj pretecon helpi kiel onta respondeculo pri LFA por atingi neeŭropanojn. **Jade** rimarkigis ke ekster Eŭropo ja ekzistas esperantistoj, sed pro iu kialo ili ne emas partopreni. Ŝi proponas ke oni analizu ties kialojn.

**Jérémie** aldonas ke li konas afrikanojn kaj ke la kunigo de fortoj de la komisionoj de UEA kaj TEJO en Afriko helpas atingi bonajn rezultojn.

**Valentin** resumas kaj invitas ĉiujn kontribui al la dokumento, kiu jam ekzistas. Li dankas kaj invitas al la venonta diskuto dum la venonta KoKu.

Voĉdonado pri 10minuta plilongigo, akceptita

*La Komitato proponas plilongigon je **10 minutoj**.*

- evidenta plimulto poras, akceptita

## 6) Konduto dum IJK

**Léon** klarigas ke komence de ĉi tiu IJK okazis problemo kun ĝenado fare de certa aliĝinto. Tial alia individua membro petis ke ni pridiskutu tiun temon en la kunsido kaj eble aldonu regulon pri la necesaj agoj en tiaj okazoj al la reglamentaro.

**Michael Boris** rememorigas la nunan regulon pri eksigo de individua membro el TEJO - decidis pri tio kune la Estraroj de UEA kaj TEJO.

**Konstanze** komentas, ke jam okazis en la pasinteco, ke iuj, kiuj jam ĝenis antaŭe, poste volis esti postenuloj en TEJO. Tial necesas iu formo por ke la sinsekvaj estraroj memoru pri la pasintaj agoj.

**Léon** diras ke ĉio devas esti ĉiam trasidebla kaj klara, ne nur en kongresoj, sed ankaŭ en la rilatoj inter volontuloj, estraranoj kaj oficistoj. **Lucas** demandas, ĉu oni eksigas membron por unufoja ago aŭ post kelkfoja, eble post admono. Ne estas klara decido

Oni proponas krei laborgrupon por revizii la oficialan aliron de TEJO al ĝenado.





**Konstanze** rimarkigis ke ankaŭ UEA tuŝis tiun temon kaj eble indas inviti ilin kunlabori, poste ankaŭ rekomendi sekvi la decidon aŭ rekomendon.

**Albert** diras ke li havas spertojn kun reglamentoj de aliaj junularaj grupoj, kiuj jam havas procezojn por tiaj okazoj, kaj pretas helpi.

**Veronika** demandas, ĉu taŭgus havi etikan komisionon kaj rimarkigas, ke ne temas nur pri TEJO-kongresoj kaj TEJO-aktivuloj, sed ankaŭ pri eventoj de landaj sekcioj.

**Valentin** demandas ĉu la posteno de konfidencpersono povus helpi. **Konstanze** klarigas, ke tio restas ekster la respondecoj de la konfidencpersono de TEJO.

**Léon** proponas kreigi laborgrupon kiel taskon por la venonta Estraro.

**Jade** proponas trovi iun eksteran spertulon, kiu helpus.

Responde al demando pri la pasintaj eksigoj el TEJO, **Michael Boris** informas, ke ekde 2016 (do, ekde la ekeksisto de TEJO kiel sendependa organizo), neniu membro estis eksigita.

**Valentin** rakontas, kiel FoJE solvas tiajn problemojn. Ili sekvas laŭgenran vicon de homoj, ĉiam en eventoj estas asignitaj homoj - anĝeloj - al kiuj homoj venas, se io malkomfortiga okazas (seksĝenado, rasismo, ktp). La temo certe estas pli larĝa ol unuavide ŝajnis.

Voĉdonado pri tasko de la nova Estraro

*La Komitato taskas la novan Estraron starigi laborgrupon pri reglamentaj ŝanĝoj kaj aliaj necesaj agoj rilate al preventado kaj punado de ĝenado kadre de TEJO.*

- evidenta plimulto poras, akceptita

## 7) Ceteraĵoj

**Albert** kuraĝigas komitatanojn membriĝi en iu komisiono aŭ interesgrupo malgraŭ tio, ke tio ne plu estas deviga.

**Manuela** rimarkigas la ekziston de neaktivaj membroj de komisionoj aŭ interesgrupoj.

**Albert** planas regule kontroli, kiu kion faras kaj reaktivigi komisionojn kaj interesgrupojn.

**Konstanze fermas la sesion je 17.12 laŭ la loka tempo.**